

Annette von Droste-Hülshoff,

[Ĉu havas iu manon tiel fajnan ...]

tradukita de Manfredo Ratislavo

Tiu ĉi poemo staras ĉe la komenco de la novelo "La juda fago".

Ĉu havas iu manon tiel fajnan,
 Kapablan dispartigi ĉiun ajnan
 Konfuzon cerban, firman tiel, ke
 La ŝtonon ĵetas ĝi tremante ne?
 Kaj kiu riskas ĝuste juĝi vant
 Impeton, pesi vorton ofendantan,
 Radikiĝintan iam firme en
 La juna brust', de l' antaŭjuĝ' venen' ?
 Vi feliĉul', naskita en la hela spac',
 Flegita vi de pia man' en pac',
 Ne pesu! Ŝtonon lasu kuŝi vi,
 Ĉar trafos vian propran kapon ĝi!

*Traduko de la Germana poemo "[Wo ist die Hand so zart ...]" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-162-320 (2004-02-04 16:19:23)